

Inaŭguro de la loĝejoj de Kultura Centro Esperantista  
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 597, 1975.03.19 & 22

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La dimanĉon 16-an de februaro kvardeko da geesperantistoj el tuta Svislando kaj el Italio grupiĝis en la urbo La Chaux-de-Fonds por la inaŭguro de la 3 loĝejoj de Kultura Centro Esperantista kaj por partopreni la ĝeneralan jar-kunvenon de tiu organizaĵo.

A.- Kun ni vi eniru la domon, kie instaligis Kultura Centro Esperantista (KCE). Ĝi situas en sufiĉe alloga loko, borde de la urbo, tute proksime de arbaro kaj de paŝtejoj. Je la teretaĝo du pordoj surhavas indikilon **ESPERANTO**. Krome maldekstre ni ankoraŭ legas la nomon **Kultura Centro Esperantista**. Enirante ni troviĝas en koridoreto, kiu nin komunikigas kun kvar laborĉambroj.

Cl.- La du sudaj ĉambroj ludas la rolon de oficejoj. Bretaroj tuj altiras la atenton. Sur ili viciĝas dokumentuoj, dosieroj, prospektoj, kursmaterialo. Pupitro, sur kiu troviĝas la telefono, skribtabloj, komodo, permesas al tri aŭ kvar personoj labori samtempe. Ili estas duonkovritaj de materialo : libroj ĵus alvenintaj, kiujn oni registras por la libro-servo, kaj libro-mendoj de klientoj, kiuj estos baldaŭ pakitaj, la lecionoj de la perkoresponda kurso programita kun la test-folioj de la gelernantoj, korespondaĵoj, kiuj atendas respondon, ktp.

A.- Nordoriente troviĝas la magazeno por la libro-servo. Bretaroj formas aron da fako, en kiuj viciĝas centoj da vendotaj libroj laŭ ĉef-rubrikoj : vortaroj kaj lernolibroj, lingvaĵoj, prozaĵoj, poeziaĵoj, religiaĵoj, sciencaĵoj, infanliteraturo, ktp. Oni trovas novaĵojn kaj la vizitantoj estas informataj, ke la inventario fine de la jaro 1974 registris librojn por sumo de svisaj frankoj 23'500.-

Cl.- Norde troviĝas la presejo. Moderna multobligilo bone laboras, kaj papero diverskvalita kaj diverskolora plenigas la ŝrankon. Ni troviĝas en iama kuirejo kaj la lavujo estas bonvena por la laborantoj, por ke ili konstante povu havi purajn manojn.

A.- La tuta loĝejo estis restaŭrita. Kontraŭ la vandoj pentraĵo memorigas, ke ni troviĝas en la ĵurasa montaro kaj afiŝoj reklamas por foiro en Esperanto.

Cl.- Sub la gvidado de sinjoro Frank Rogers, kiu venis el Londono por alporti sian kunlaboron, la vizitantoj forlasas la sekretariejon por iri rigardi la aliajn loĝejojn. Tiu, kiu troviĝas ĵus apud la sekretariejo, ludas la rolon de renkontiĝejo : kuirejo estas je la dispozo de la gastoj kaj vidalvide ni rimarkas manĝejon, kiun oni ankaŭ uzas kiel kursejon. Dua samgranda ĉambro ankaŭ permesas la aranĝon de kursoj aŭ kunveno. Kaj unulita ĉambro estas la loĝloko de kunlaboranto de KCE.

A.- La tria loĝejo enhavas alian unulitan ĉambron kaj du dultajn ĉambrojn. La kuirejo fariĝis lavĉambro. Kiam KCE posedos sufiĉe da mono, en ĝi estos instalitaj duŝejoj kaj pluraj lavujoj.

Cl.- La vizitantoj povis konstati, ke en tre malmulte da tempo Kultura Centro Esperantista jam rikoltis multe da mebloj. Ĉiuj reprezentas donacojn. Sed ankoraŭ mankas multe da materialo ; por la sekretariejo pupitroj, tajpiloj ; por la renkontiĝejo malpli improvizitaj kuirilaro kaj manĝilaro, tabloj, seĝoj ; por la gastejo pli komfortaj litoj, tabloj, seĝoj, foteloj, speguloj, duŝo, lavujoj, ktp. La akiro de tiu ĉi materialo dependos de la malavareco de la esperantistaro.

A.- Tiu vizito finiĝis en la renkontiĝejo, kie ĉiuj estis invititaj veni trinki glason da vino aŭ da vinbersuko. Tostoj celebradis tiun venkon de la svisa esperantistaro, gratulis ĉiujn personojn, kiuj kunlaboris al la starigo de Kultura Centro Esperantista. La blanka vino, kiu estis gustumita, kreskis en la vitejo de la prezidanto d-ro August Braun. Ĝia trinkado rapide varmigis la atmosferon, kaj estas en granda entuziasmo, ke la ĉeestantaro aŭskultis s-ron Claude Piron, instruisto ĉe la Universitato de Ĝenevo, proponi la adopton de 5 rezolucioj en la celo foje rebati la atakojn kontraŭ esperanto de iaj defendantoj de la franca lingvo.

Cl.- La Ĝenerala Jar-Kunveno de KCE dum la posttagmezo adoptis tiujn rezoluciojn, kaj ilia dissendado al plej diversaj gazetoj tuj kaŭzis tre pozitivan eĥon. La gazetaro, la radio kaj la televido komprenis, ke finiĝis la tempo, kiam la esperantistoj akceptas senrebate insultojn kaj misfamigajn fals-sloganojn. Okaze de venonta elsendo ni diros kelkajn vortojn pri la decidoj de tiu Ĝenerala Jar-Kunveno kaj pri tiuj 5 rezolucioj.

A.- Vi havu foje la okazon viziti la sekretariojn kaj renkontiĝejon de Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!